

# ESPERANTO

## ★ TRIUMFONTA ★

Oficiala Organo de la XV-a Universala Kongreso de Esperanto. — Publikigilo de multaj gravaj Esperantistaj organizaĵoj. Aperas semajne. — Senpagaj monataj aldonoj: „Internacia Komercio“ kaj „Revuo“ (literatura, popolscienca).

Protaktantoj:

Dr. Leono Zamenhof, Warszawa  
W. M. Page, adv., Edinburgh  
Ernest Archdeacon, Paris  
J. Gili Norita, komercisto,  
Barcelona

H. Fischer, grandindustriisto,  
București  
Frans Schoofs, Antwerpen  
P. v. Medem, bank-kaj fabriko-  
direktoro, Kaunas.

N-o 150  
5. 8. 1923

Redakcio:

Cefredaktoro: Teo Jung.  
Redaktoro: Robert Kreuz.  
Redakciaj kunlaborantoj:  
Zanon (literaturo)  
M. Butin, L. K.

Administracio:

(Preciza poŝtadreso).  
Esperanto Triumfonta  
Horrem bei Köln, Germanlando.  
Tarifon  
vidu sur speciala folio, kiu estas aldon-  
ata al ĉiu specimena kaj unua numero  
de nova abono.

Antwerpen, Barcelona, București, Edinburgh, Horrem, Kaunas, Paris, Warszawa

### Latva Svisujo.

La belajoj de Svisujo estas tiel ĝenerale konataj, ke eĉ belajn regionojn en aliaj landoj oni nomas „Svisujo“. Ankaŭ Latvujoj havas sian „Svisujon“. Ĝi troviĝas ĉ. 50 km de la ĉefurbo

Riga ambaŭborde de rivero Gauja kaj estas facile atingebla per fervojo.

La ĉefaj vidindaĵoj de Latva Svisujo estas la ruinoj de la mezepokaj kasteloj

Sigulda (Segewold), Krimulda (Kremon) kaj Turaida (Treyden). Sigulda troviĝas sur maldekstra bordo de Gauja. Ĉefe rimarkinda estas ĝia kvarangula turo kun la antaŭkastela pordego, sur kies fronto estas ĉizita la blazono de la grafo von den Borg, posedinto de Sigulda. La ruinoj de Krimulda estas kontraŭ Sigulda, sur dekstra bordo de Gauja. Tiu ĉi kastelo estas konstruita en 1255 kaj fariĝis en 1817 posedaĵo de Princo Lieven. La plej fortika

kastelo estis Turaida, proksime de Krimulda. Ĝi estas konstruita en la 15-a jarcento de la liva ĉefo Kaupo kaj ekdestruita en la 17-a jarcento.

Inter la kasteloj de Krimulda kaj Turaida troviĝas interesa kaverno, la „Gutmanala“ (Gutmankaverno). Ĝi havas larĝecon de 88 futoj kaj profundecon de 66 futoj. Iom pli alte situas malpli



granda kaverno, la t. n. „Wiktorija ala“ (Viktoria-kaverno); ĝi estas loko de tragika epizodo, okazinta en la komenco de la 17-a jarcento. May, juna fianĉino, estas mortigita ĉi tie. La legendo ankoraŭ pliromantikigis tiun epizodon. Laŭ alia famo la mortigo okazis en la „Kaverno de la Diabolo“, troviĝanta je 3 1/2 km malsupre de la rivero. Nia ilustraĵo montras la samideanojn de Riga dum ekskurso en Latva Svisujo.

### Nürnberg \*)

Urbobildo de Friedr. Wilh. Illing, Wien.

En festanta belegeo brilis la steloj. De Nürnberg estis videbla nur la pordega turo kontraŭ la stacidomo. Lunlumo mankis. Mi restis en la stacidomo.

Malrapide ŝtelpasas la tempo. En la „Restoracio“ sidis dormantaj gastoj. Mi ne ŝatas ĉi tiun lacecon de malriĉuloj, kiu evitas la hotelojn. Mi ne povas dormi. Mi rigardegas en la heligitan nokton.

Sed la horloĝo funkcias. Ĝia funkciado estas promeso de tiaj horoj pri mateniĝo.

Tutalte en la vitra kovraĵo de la halo super la reloj lumis jam krepuske. La horloĝo montris je tri kvaronoj de la kvara.

Tiam mi ekstaris ĝoje kaj iris en la vekigantan matenon.

Nur nun mi vidis la grandon kaj belon de la stacidomo. „Nürnberg Hauptbahnhof“. Kiel antikve kaj kiel moderne tio sonas.

Sed transe sonĝis jam mezepokaĵo. Griza, dikronda pordegturo. Kaj la fabelo ekmalformas. Alfrontonaj, kvazaŭ faldvizaĝaj domoj, leviĝantaj kaj malleviĝantaj stratoj, travidejoj de unika beleco.

Neniu homo estas en la stratoj. Nur maljunulo kaj knabino en frankaj kostumoj kiel viviĝinta legendo.

Ĉu mi vivas en la dudeka jarcento? Ĉu mi ne estas ĉi tie jam foje? Ĉu sonĝo iĝas palpobla?

La Lorenz-preĝejo superstaras. Ho gracia puto! Ĉu la placo ne pleniĝas per strangaj kostumoj?

La meditante digno de la pintaj turoj, la maljuneca korodiĝo de sonĝantaj ŝtonoj kaj antaŭ ĉio la formabundeco de la reliefiga helgriza rozo de la fasado. Kia travivaĵo!

La vasta silenta foirplaco kun elokventaj, serioze kiel en pensoj profundigintaj domoj vastiĝis antaŭ mi. La malaltlarga pintohirta Virgimpregĉeĵeto kun arte ĉirkaŭŝirmita enirejo alridetas min. Kaj transe dormas la pie germana gotika puto. La foirvigla pelado mankas.

\*) El la felietonkorespondado „Welt und Leben“ („Deutsche Pressekorrespondenz“) laŭ la germane verkita originalo de nia samideano F. W. Illing.

### Tri salutetoj

1. Aŭgusto.

(Anstataŭ flugfolio)

Al la XIII-a (Praga):

Laboru, ne tro multe festu;  
Agadu, ne tro multe gestu.

Sukceso venas kiel kolombo  
Dolĉpedete kaj sen plombo.

Jen Esperanto, jen ĝia masko.  
Saĝa elekto: jen via tasko!

Al la XIV-a (Helsinki):

Pinarbo norda staras  
Atende en verda ornamo;  
Mansignas la branĉoj invite:  
Ho venu al festo de l' am'!

Revadas ĝi pri stelo  
Venonta ŝipe sur maro;  
Surflage ekbrilas Espero,  
Surscipe esperas homar'.

Al la XV-a (Nürnberg):

Por kongreson inde kroni,  
Ne necesas fanfaronoj;  
Plensufiĉas, por imponi,  
Nur realajn faktojn doni. —  
Ne koleru, ke proponi  
Nur ĉi tion kaj admomi,  
Al modero vin ekspronu,  
Riskis fidelul'

Zanon.

### Socia Vivo

#### Plena raporto pri la Kvara Internacia Labora Konferenco.

La plena raporto pri la Kvara Internacia Labora Konferenco de la Ligo de Nacioj, kunveninta en Genève en Oktobro kaj Novembro 1922, konsistas el du grandaj volumoj, enhavantaj entute 1166 paĝojn. Malmultaj tiaspecaj oficialaj eldonaĵoj entenas tiom da ĝenerale interesaj detaloj.

Laŭ la kondiĉoj de la Versailles-a Kontrakto, la Internacia Labora Konferenco devas kunveni almenaŭ unufoje ĉiujare, kaj ĉiu el la 55 ŝtatemembroj de la Internacia Labora Organizaĵo rajtas sendi kvar delegitojn — du reprezentantajn la registaron, unu la mastrojn, kaj unu la laboristojn. Ĝi estas do nesuperbla kunveno de spertuloj pri demandoj koncernantaj la laborantojn. Lord Burnham, kiu prezidis duafoje la Konferencon, atentigis en sia ferma parolado al la graveco de tiu Konferenco por la estonto de la mondo. „La komisiio“ li diris, „de ĉi tiu granda kaj prezenta Konsilio de la nacioj estas studi kaj progresigi la bonstaton de la granda plejmulto el la popolo en ĉiuj regionoj de la mondo. Ĝi estas la servanto, kaj ĝi povas iamaniere esti la instruanto, de registaroj kaj registoj pri la taŭga kaj kompara traktado de industria problemoj. Mi demandas al vi, kiuj funkcioj povas esti pli gravaj por la ĝenerala progreso kaj kontento, ĝuste hodiaŭ, kiam dekeduo da novaj ŝtatoj estas kreitaj, aŭ revivigitaj post multe da jaroj, en tiu ĉi ĉefa (se estas ankoraŭ permesite nomi ĝi tiel) kontinento Eŭropo, kaj kiam en aliaj kontinentoj estas tiom da ŝtatoj, de vasta amplekso kaj de neelĉerpebla riĉeco, kies ŝtatistoj kaj oficistoj ĉiam alvokas nin, petante la plej plenan informon pri tio, kio fariĝas ĉiutage, por progresigi la bonstaton kaj kapablecon de la laboristoj en ĉiuj kategorioj kaj en ĉiuj situacioj.“

La volumoj entenas ankaŭ la raportojn de la Komisionoj de Spertuloj nomitaj de la Konferenco por esplori la diversajn demandojn laŭ la teknika vidpunkto kaj la raporton de la Direktoro de la Internacia Labora Oficejo, s-o Albert Thomas, pri la agado de la organizaĵo ĝis la malfermo de la Konferenco.

Nota: Bonvolu sendi al la Bureau international du Travail, Genève, ekzemplerojn de gazetoj presantaj tiun ĉi komunikon.

Trad. F. Zwach.

### Pago de salajroj dum libertempo.

Depost la milito, la sistemo de libertempo kun pago de salajroj por manlaboristoj praktikigis almenaŭ en iuj industrioj en pluraj landoj. Informoj pri legoj faritaj aŭ projektitaj kaj pri kolektivaj laborkontraktoj ordonantaj jaran libertempon kun salajroj estas aldonitaj en Sociataj Informoj, la ĉiusemajna eldonaĵo de la Ligo de Nacioj.

En Granda Britujo, la Ministerio de Laboro konas pli ol 100 kolektivajn kontraktojn aŭ malpli formalajn aranĝojn flaspacajn. La plimulto el la kontraktoj kondiĉas ke salajroj estu pagataj por legaj ferioj kaj aldone por libertempo kies daŭro diferencas de 5 ĝis 12 tagoj ĉiujare. La rajto je libertempo ordinare komencas post deĵoro dum 6 aŭ 12 monatoj, kaj iukaze la daŭro de la libertempo diferencas laŭ daŭro de deĵoro.

En Germanujo, en 1921, 72 procentoj el la tuta nombro da kontraktoj enhavis kondiĉojn pri libertempo, kaj la laboristoj kiuj ĝuas tiajn kondiĉojn estis 86 procentoj el la tuta nombro da laboristoj koncernataj de kolektivaj kontraktoj. La meza daŭro de la libertempo estis tri labortagoj en 50 procentoj el la kontraktoj kaj de tri ĝis ses tagoj en 41 procentoj.

En Aŭstrujo, laŭ la Leĝo pri Libertempo por Laboristoj (1919), iuj kategorioj de laboristoj ĝuas neinterrompitan libertempon de unu semajno ĉiujare post daŭra deĵoro dum unu jaro, kaj de du semajnoj ĉiujare post daŭra deĵoro dum kvinjaro.

En Italujo, la sistemo de pagata libertempo estas nun starigita per kolektivaj kontraktoj en la plejmulto el la ĉefaj industrioj. La daŭro de la libertempo diferencas de ses tagoj en la ĥemia, metala kaj teksa industrio ĝis dekedu aŭ eĉ dekkvin en gasaj kaj elektraj entreprenoj kaj presejoj. Generale la rajto komencas post deĵoro dum unu jaro, kaj en iuj okazoj dum ses monatoj.

En Ĉeĥoslovakio, la Registaro intencas baldaŭ proponi al la Parlamento projekton de leĝo por starigi libertempon por laboristoj. La projekto ampleksas industriajn laboristojn, domservistojn kaj metlernantojn. La daŭro de la libertempo estos ses labortagoj por laboristoj plenumintaj neinterrompitan deĵoron dum ne malpli ol unu jaro, nek pli ol dek jaroj, kaj dekedu labortagoj por laboristoj plenumintaj neinterrompitan deĵoron dum pli ol dek jaroj.

Noto: Bonvolu ŝendi al la Bureau international du Travail, Genève, ekzemplerojn de gazetoj prezentantaj tiun ĉi komunikon.

Informservo de la Int. Lab. Oficejo.

## Kroniko.

Por servi nian legantaron per ĉiam aktuala, fidinda kaj kompleta informaro, ni bezonas sciiĝojn (sur postkarto aŭ aparta folieto unuflanke skribite, sed ne inter administraciaj aŭ privataj sciiĝoj) pri ĉiu novaĵo el la Esp. movado. Kondiĉoj: rapide, koncize, fidele, legeble (precipe nomoj).

### Landoj.

#### Ameriko.

##### Brazilio.

D-ro A. Lopes da Cruz, konata advokato kaj direktoro de la Instituto Teknika de Ekonomio kaj Eitika Sociologio, sendis al s-o Ministro de la Interno interusen raporton pri la projekto de reformo de la Publika Instruado publikigita en la ĵurnaloj por ricevi amendamentojn kaj sugestojn. Parolante pri la kurso de la Kolegio Pedro II li diris la jenon: "Tiu rilato mi estis radikala, forigante la lernadon de la latina kaj franca lingvoj, nur konsentante pri Esperanto, praktike instruita kiel internacia lingvo."

##### Usono.

Philadelphia. Grupo de laboristoj el la oficejo de American Friends Service Committee komencis kurson en Esperanto. La helpa laboro de tiu komitato saĝne neduble montris al ili la necesecon de helpa lingvo.

##### Meksiko.

Meksiko-urbo. La bone konata Akademio de lingvoj de nia samideano P. S. Rodriguez donas senpagajn lecionojn en Esperanto ĉiujarde.

Tampico. Malnova samideano E. E. de Guerra kaj edzino fervore subtenas E-on. Duloje en la semajno instruado al postoficistoj. La grupo havis en septembro 1922 dektri membrojn; hodiaŭ ĝi havas dudektri.

#### Anglujo.

##### Kolonelo John Pollen. †

Kadavro, ondiĝinte mardon en Auchencairn, malgranda vilaĝo sur la Firth Solway (Skotlando), ĵajden nokton, hieraŭ estas certe konfesia de Kapitano John Pollen de Port St. Mary, kiel tiu de lia patro, Leif. Kol. John Pollen, 75 jara, antaŭe eminenta membro de la Hinduja ŝtata civiloficistaro. Lastfoje li vidigis en Castle-town, ne malproksime de sia hejmo, la vesperon de 18. Junio, kaj supozeble la maro forportis la kadavron almenaŭ 60 mejlojn ĝis Auchencairn. Sur ĝi oni trovis krokoŝilditajn tomistojn enhavantajn ĉeklibrojn kaj broŝureton en Esperanto, kun la nomo, John Pollen, kiuj kuzitis cericeon. Granda lingvisto kaj aŭtoro de du verkoj pri Rusia poezio la kolonelo estis en jaro 1905 speciala korespondanto de la Daily Mail, en St. Petersburg. Aldoninde povas esti, ke lia traduko de la Rubajay de Omar Khayyam finiĝas per 12 strofoj Esperanigitaj. Lia prezidanteco de la Brita Esp. Asocio daŭris de 1904-1912.

#### Belgujo.

Brugge. — Post paroladoj de f-ino Thooris kaj s-o Dervaux, la grupo malfermis kurson gvidata de la sindonema Sekretario, s-o Dervaux kaj ĉeestanta de 50 personoj.

#### Danzigo.

Danziga Esperanto-Asocio, partopreninte la 12.7.1923 en florkorso de Zoppota Sportsejmo donis apartan veturilon, pri kiu raportis „Danziger Neueste Nachrichten“:

jen la internacieco! Sur tabulforma veturilo sub giganta, kvinpinta sielo estas unuigitaj reprezentantoj de ĉiuj nacioj, kiuj intencas esprimi la ideon de la mond-lingvo. Estis la veturilo de la Danziga Esperanto-Asocio.

„Danziger Allgemeine Zeitung“ raportis: Ankaŭ la Esperantistoj elmetis veturilon, sur kiu ĉiuj nacioj de la tero paceme kuneestis sub la Esperantostelo. Entute ĉarma bildo...

#### Francujo.

Avignon. — Dank' al la klopodoj de f-ino Roussel, kiu gvidas kurson de la Komercita ĉambro, ĝi aliĝis al la lasta rezolucio de la Parisa Komercita ĉambro.

Bordeaux. — En la Foiro, malfermita la 15. Junio, kiel ĉiujare, funkcias esp. budo, senpaga disponigita de la Foiro Administrazio kaj gvidata de membroj de loka gr. Constantine. La grava framasona loĝio „Circa“, post parolado de sindona Esperantisto, aliĝis al la Komitato de Esperantista Framasona Patronado.

Haybes (Ardennes). — Vigla propagando de nia sam. s-o Servais, distrikta konsilanto, eks-milita observisto en Guyane.

Orléans. — En la regiona Foiro-Ekspozicio (8.-15. jun.) estis esp. budo, organizita de la loka gr. kaj sukcese funkciinta. Inter la ekspoziciantoj estis najl sam.: Caillard, vicprez. de la gr. de Montargis (abelkulturado), Lorillon (mekanografio) kaj Magnus-Focke (pianoj kaj muziko).

Paris. — La esp. budo en la Parisa Foiro (10.-28. majo), gvidata de f-ino Gérard kaj s-o Roussau, akceptis multajn vizitantojn. 10000 preparajtoj fidi estis disdonitaj. Kelkaj ekspoziciantoj, inter kiuj la Internacia Labora Oficejo, afiŝis Esp. dokumentojn. Deĵoris en la budo s-inoj Bichsel kaj Prévost kaj s-oj Agourine, Jadot, Marchand, Lobut, Echard.

La 12 majo okazis en la ejo de Franca Societo de Fotografio, kunveno de la „Asocio por franca ekonomia disvastiĝo per E.“ (nova nomo de la Societo „Komercita kaj E.“, sub la prezido de Generalo Sebert. S-o. A. Baudet, membro de la Parisa Komercita ĉambro, faris paroladon pri la utilo de E., la Konferenco de Venecia kaj ankaŭ 20-minutajn kursojn de E. Inter la ĉeestintoj estis: S-o Pascalis, eksprez. de la Parisa Komercita ĉambro kaj kelkaj al ĝiaj membroj, membroj de la Societo de Civilaj Inĝenieroj de Francujo, s-o P. Gourlay, ĉefredaktoro de eldono „Le Cuir“, ktp.

Ĝi estas la unua publika paŝo de la Societo en la rondoj de la Parisa komercita kaj industria. La nunta prez estas s-o Dénys, inĝeniero diplomita de la Parisa Centra Lernejo, 20, rue de l'Arc-de-Triomphe, Paris-17-e.

En sia kunsido de la 28. apr., la estraro de Respublika Komitato de Komercio, Industrio kaj Agrikulturo (grava ekonomia organizo) kies prez. estas na amiko, Senatano Chauvet, decidis, post lego de leteroj pri Venecia de nia sam. Guéritte, eksprez. de la Franca Komercita ĉambro en London, krei komisionon por pristudi E. Ĉiuj partoprenintaj estraranoj parolis favore al E.

La gr. de Rennes, ne povante restarigi, donacis, pere de ĝia vicprez., Kolonelo Georget, la sumon de 200 fr. al la Feder. de la Parisa regiono. La Komitato decidis uzi tiun sumon por la ebla restarigo de gr. en Rennes aŭ de Feder. de Bretonio.

La intencpo de promenedoj komencis. La 17. junio, la „Esp. Klubo“ aranĝis sukcesan promenadon sur vaporsipo al St.-Cloud, sub la gvido de s-oj Knopf kaj Petit.

Perpignan. — La 21. majo la gr. aranĝis promenedon al Ermitaĝo de Força Réal, por kiu la fervoja Kompanio donis specialajn vagonojn. Alia promenado la 17. junio okazis al Saint-Martin du Canigou.

Rennes. — Malgraŭ la klopodoj de niaj malnovaj sam., kolonelo Georget kaj apotekisto Chauvin, la gr. ne estas ankoraŭ restarigita. Nova sam. D-ro Barbador ankaŭ propagandas.

Rosny-sous-Bois. — La agema gr. komencis serion de someraj promenedoj, kiujn partoprenas multaj Parisaj sam.

Toulon. — En ĉambro donita de la urbestro, s-o Gauvin gvidas kurson.

La nova prezidanto de la Societo Franca por la Propagando de Esp. estas s-o Eyquem, hon. konsilanto de la Parisa Apealacia Kortumo, vicprez. s-oj E. Archedecon kaj D-ro Vanvert. La antaŭa vicprez. s-o Rollet de la Selve estas akklamita hon. prez.

#### Ce la „Verda Kato“.

Paris. La 4-an de julio, antaŭ pli ol 100 personoj, ĉe la Verda Kato, jam fame konata Kabareto, oni ludis unufoje originale verkitan opereton bulleskan: „La Ramolidoj“ de Daniel Eyquem. La partiturojn komponis la konata muzika-aŭtoro de la Espero: s-o Barono F. de Méuil.

Tiu-ĉi teatraĵo, vigle kaj brile ludita de niaj verdkatanoj, pritraktas la temon konatan de tiu ŝajne sovaĝa, sed funde bonkora, maljuna oficiro kariera: nome Kolonelo Ramolo.

Belaj duetoj kaj kantoj pliagrabilis laŭludajn, liverante al ĝi tiu opereton aspekton. Menciindaj estas la dueto de Timiano kaj Třebulad, kaj la Ario de Malvino.

Ce la fino la ĉeestantaro aplaudis, jen al la aktoroj, jen al la aŭtoroj, kiuj ja meritis partopreni en la aplaudado. Sed tio ne sufiĉis al postulema publiko, kiu ilin devigis eniĝi en la soldate vestitan ludantaron.

Entute estis bona vespero, kies sukceson ni aldonos al la aliaj de nia Internacia Kabareto. — Marc Hand.

#### Germanujo.

Frankenberg i. Sa. Propaganda kunveno por ldo, kiu okazis en Frankenberg i. Sa., havis grandan sukceson, certe neatenditan de la entreprenitoj. En la kunveno, la lerneja gimnasistoj, trovigis krom 5-6 idistoj kaj kelkaj indiferentuloj granda nombro da Esperantistoj el Frankenberg, Chemnitz, Oĉeran kaj Dresden. La idista parolisto, s-o Oehmichen, Leipzig, pritraktas la temon: Kion lernu nia infanoj — ĉu nacian fremdlingvon aŭ la mondlingvon. La mondlingvo estis ldo. S-o Hahn, Gohlis, komisiita de la Esp. Inst. por la Germ. respubliko kaj de la Saksa esp. instruistaro havis facilan taskon montrante la grandegan progreson de Esperanto dum la lastaj jaroj (Genève, Venezia, Nürnberg) kaj raportante pri la disvastiĝo de Esp. en la lernejoj. La peto, ĉiuj similajn faktojn rilate al ldo, embarasigis la entreprenitojn. Supera instruistaro Melzer, Chemnitz, kiu bone scipovas ldon, tre efike debatis kun niaj kontraŭuloj pri lingvaj demandoj, kaj s-o Leuschner de la laborista grupo Chemnitz lerte kaj impresive raportis pri la temo „Esperanto kaj laboristoj“. Tiamaniere la kunveno, ferigis poresperanta propagando, kiu havis jenajn sukcesojn:

1. La esp. grupo Frankenberg, revigigita kaj refortigita denove kunvenos regule.

2. Nova kurso por fervojistoj komencos la 1-an de septembro.

3. Urba parlamentano partopreninta la kunvenon promesis subtenon de petskribo al la magistrato por lerneja ĉambro por la grupaj kaj kursaj vesperoj.

Post la kunveno 50-60 gesamideanoj ĝoĝigitaj pro la sukceso kolektiĝis en Schillergarten.

#### Italujo.

La ĉi tiea „Esperanta Domo“ starigis „Komitato de Propagando Esperantista“, kies honora Prezidanto estas Komandoro Stefano Conio, Asesorio pri la Komunuma In-

struado; — efektiva Prezidanto Johano Mainardi, kaj Sekret. Librot. Johano Tanzi.

Zorge organizita de l' komitato mem, la 2. junio ĉe la mondfamkanta „Reĝa Konservatorio Muzika“ okazis grava propaganda festo, kiun ĝentile partoprenis la famkonata Muzika Societo „Mandolinisti Milanesi“. — Tiuokaze publike paroladis Kom. s-o Stefano Conio je la nomo de l' Komunumo, certigante ke la Komunumo mem estas favora al Esperanto, ĉiokies reenkonduko en la komunumajn lernejoj estas preskaŭ certa. — Al la respondis D-ro Angelo Filippetti (eksurbestro de Milano), lin dankante en la nomo de l' Milana Espero.

Tre efika propaganda festo, kiun partoprenis 800 aŭstanoj.

La Milanaj kaj najbaraj Esp. Grupoj faris propagandan montekskurson al Erba miksitaj al preskaŭ 1500 biciklistoj, anoj de A. P. E. F., kaj A. P. E.

La 4. majo okazis la ekzameno de la ĉi tiea „Proletaria Universitato“. 15 ekzamenitoj, kiuj senesepte sukcesis. Gvidinto Sam. Joh. Mainardi.

Ce Komercaj Oficistoj s-ano Caetano Nobili gvidas unuagradkurson. 20 partopren.

S-ano D-ro Dom. Carbone alian unug. K. ĉe la „Libro-laboristoj“, 20 partopren.

Ce la „Proletaria Univ.“ oni malfermis alian unug. K., pri kiu ĝis nun mankas informoj.

S-ano Hipolito Piatti daŭrigas sian triag. kurson ĉe la „Esperanta Domo“. 12 partop.

Ce „Esperanta Domo“ ius okazis la ekzamenoj de la unua rada kurso gvidita de s-ano Busso.

Ce „Esperanta Domo“ mem s-anoj Rota kaj Mainardi daŭrigas siajn triagradajn kursojn.

La 5. junio oni fermis unuagrad kurson de s-ano Joh. Mainardi ĉe la „Proletaria Universitato“ de Musocco. — Baldaŭ okazos la ekzamenoj.

S-ano Mainardi gvidas kurson ĉe la Estraro de l' „Ufficio Unico Paritetico Lavoratori della mensa“, al kiu baldaŭ sekvos kurso ĉe la ties Societianoj.

#### Nederlandoj.

La E-grupoj en Wormerveer kaj Beverwijk faros komunan ekskurson al la marbordo la 12. aŭgusto. Gastoj bonvenontaj.

Dordrecht. La grupo aranĝis la 15. junio E-ekspozicion. Kiel rezultato kurso kun 18 partoprenantoj estas komencita.

#### Polujo.

Bydgoszcz. Esp. ekspozicio en monro-fenestro de kelkaj ĉelbirejoj urba. — PEservo sendis skribaĵojn al la E-on favoranta Ministro por Aferoj Internaj, s-o D-ro W. Kiernik kaj al la Ministro por Aferoj Eksterlandaj, s-o M. Seyda. — pelante, ke la pola registaro konsideru ĉe la efektiveco de sia nun intencata plano, propagandi Polujojn en eksterlando, E-on kiel gravan faktoron.

Katowice. Daŭra fervoja propagando de red. Kobylński, gvid. de loka P. A. T. (Polska Agencia Telegraficzna). — La ĵus fondita grupo kalkulas 50 p. E-o kurson partoprenas 28 p.

Lódz. Kurson por hebreaj laboristoj en juda instru-lingvo fingvidis s-o I. Lejzerowicz. — En junulara societo socialista „Sila“ (Fotio) gvidas kurson pollingve s-o Silberström; partoprenas ĝin 40 p.

Pola Esperanto Servo, Bydgoszcz.

## Poŝtaŭtomobila servado sur la Svisaj Alpo-transirstratoj.

Jam la Romanoj konstruis armeo-stratojn tra tiuj ĉi regionoj kaj tiuj kelkaj alproajn kiel ekz. „Mons Poeninus“ (Granda Sankta Bernhard), „Mons Spluga“ kaj „Sete Mons“ (Septimer), sed iliaj stratoj estis mallarĝaj kaj ofte tre kruaj.

En la mezepoko ankaŭ aliaj svisaj alproregionoj estis transirebligataj, tiel la „Gothardo“ (1220), la „Simplono“, „Bernina“, „Bernardino“, „Grimse“ ktp., sed nur piede.

La Renesanco kaj la Reformacio akcelis la sciencon, la metion, la komercon kaj la vojaĝadon tial ke baldaŭ la malnovaj stratoj aŭ vojoj kaj la iamaj transportiloj ne plu sufiĉis. Devige oni plibonigis la stratojn kaj rulis sur ilin meze de la 18-a jarcento la unuajn poŝtveturilojn, sed ankoraŭ ne trans la alpojn. En la tiag regionoj la unuaj artefaritaj alpo-transveturstratoj estis konstruitaj en la unua duono de la 19-a jarcento, tiel „La Simplono“, „Gothardo“, „Bernardino“, „Splugo“, „Julier“, „Maloja“, „Granda Sankta Bernhard“, „Bernina“, „Lukomanjo“, poste „Fluela“, „Ofen“, „Furka“, „Oberalp“, „Grimse“, „Brünig“, „Klausen“ kaj dum la lastaj jardekoj ankoraŭ aliaj belaj alpo-stratoj. Sur ili, konstante pliperfektitaj poŝtveturiloj firitaj de 4 ĝis 6 ĉevaloj estis riligataj por la persona kaj pakaja transporto.

En la jaro 1823 la unua vaporsipo kaj en 1848 la unua vagonaro veturis en Svislando. Nun ja veturas centoj kaj miloj tage, kaj la vagonaroj traveturas aŭ suprenveturas montojn, kiel la „Gothardo“, „Lötschberg“, „Raccia“, „Bernina“, „Brünig“, „Montreux-Oberland“, la „Jungfrau“, „Gornergrat“, „Niesen“ kaj „Pilatus“.

Pro la multnombraj fame konataj naturbelaj de la svisaj alproregionoj la turismo konstante kreskadis kaj komfortiĝis. Kiel la fervojoj, precipe ankaŭ la svisa Poŝt-administracio efike perfektitigis kaj modernigis sian transport-kaj vojaĝo-servadon. Tial ĝi anstataŭis eĉ dum la ekonomia krizo de la lastaj jaroj la plej grandan parton de la ĉeval-poŝtveturiloj por la pli rapida kaj komforta Poŝtautomobilo kun 10 ĝis 20 sidokoj. La veturarkujo variantaj laŭ la stratalteco inter 20 ĝis 40 centimoj po km estas modera. 10 ĝis 15 kg da vojaĝo-pakajo estas senpaga. La pasaĝero kaj lia pakajo estas asekuratataj laŭleĝe. Pli detalajn informojn volonte donas la poŝt-, fervoj- kaj turist-oficejoj.

La veturado per poŝtautomobilo tra kaj trans la majestajn kaj panoram-riĉajn alproajn kun la profundaj valo, fendegoj, pentridaj glaciarioj,



Parolejo.

191.

Rilatas al 167 kaj 185.

Koncerne la nederlandan prefikson ge- mi rimarkigas, ke ĝia signifo ne estas precize la sama, kiel en Esperanto. Ekz.: gebroeders=fratoj, sed ne gefratoj. Cetere, ekzistas ankoraŭ alia prefikso ge- nome por formi la plej multajn partopojn pasintajn; ekz.: helpen=helpi, geholpen=helpi(n)ta, ktp. Sed la ekzemplo donita en ET tute ne taŭgas, ĉar en tiu vorto ge- ĉe ne estas prefikso, sed parto de la vorto mem (getuigen=atesti, atestantoj, atestantinoj aŭ atestantinoj, getuige=atestant(in)o).

Rilate la kelkfoje nomiat germanan vorton Gemütllichkeit, kiun ne estas tradukebla en alian lingvon, mi rimarkas, ke en la nederlanda lingvo ĝi estas ankaŭ uzata: gemoedelijkheid. G. J. Degenkamp. Utrechi.

Gardenistoj atentu!

Kiu el vi scias ion pri „von der Deckens Lobelio“?

Mi legis en verko, ke ĝi kreskas sur la altmontaro de Meza Afriko, precipe en la regionoj de Ruwenzon. Ĝi atingas altecon ĝis 10 metroj.

La verkisto miris, kial oni ĝin ne vidas en ornamgardenoj eŭropaj, ĉar sur la altmontaro de Ruwenzon ĝi ofte estas devigata elteni grandajn neĝoventegojn.

Se troviĝas gardenistoj en Eŭropo, kiuj ĝin kreskigas, mi estas tre dankema por informo.

R. Horrisland, Sveland, Krsand, Norvegiujo.

Bibliografio.

Nur duoble ricevitajn librojn, prospectojn k. s. ni mencias aŭ recenzas. Kiam libro aperis b'indite, ni metas minimume unu b'inditan ekzempleron.

Libroj kaj recenzoj.

Bukedeto. (Sep diversnaciaj rakontoj.) Tradukis kaj kompilis Margarethe J. Krestanoff. Kun antaŭparolo de Marie Henkel. 47 pĝ. 12:16 cm. Sudgermana Esperanto-Eldonejo Oskar Ziegler, Deisenhofen bei München.

Cu estas hazardo, ke post apero de „Bukedeto“ (ĉe Esperanto Triumfonta, Horrem) ĉiras verketo filotila „Bukedeto“? Sajnas, ke jes. — La edzino de nia bonkonata bulgara propagandisto donacas al mi ĉi tiun libron, kiu laŭ vortoj de s-ino Flanke, spegulas la sep kolorojn de la ĉielarko. — Laŭ lingva vidpunkto mi ne ĉie aprobas la tradukon, kelkloke min sokis naciismo, sed mi ne dubas, ke multaj sentos ĝuon dum la legado. G. Ajul.

Gazetoj.

- The British Esperantist, London, julio.
Svenska Arbetar Esperantist, en Göteborg, julio.
Holanda Esperantisto, Zutphen, n-o 81, julio.
Internacia Komercio per Esperanto, Paris, 1. julio. Aldono al France Europe Orient.
Esperanto Praktiko, Berlin S. W. 61, julio.
France Esperanto, Paris, julio.
Esperanto, Geneve, julio.
Italita Esperanto Revuo (L'Esperanto), San Vito al Tagliamento, julio.
La Espero, Stockholm 1, julio-aŭgusto.

Gazetoj.

- Liberté, Paris, 30.6. Granda art. de A. Baudet pri Esp. kiel komerca lingvo.
„X-Information“, mon. bulteno de la lernintoj de Politeknika Lernejo, Paris, junio. Granda art. de s-ano eks-ĉefing. de pontoj kaj vojvoj Moissenet.
Le Travailleur des P. T. T., Paris, enhavas per Esp. kronikon pri la poŝtista movado en div. landoj.
Est Républicain, Nancy, 28.6. Citas la art. pri Pasteur en ET.
L'Étoile de l'Est, Nancy, 28.6., Le Progrès du Nord, Lille, 28.6., Le Travail, Toulouse, 1.7., La Bulgarie, franclingva gazeto en Sofia, 28.6. kaj aliaj gazetoj priiraktis la porgermanan propagandon per Esp.
Jugoslavenki Narod, Zagreb, 15.7., 17.7., 19.7., 21.7., Latvija, Riga, 18.7., kun traduko latva de artikolo „Albano“ el nia aldono „Internacia Komercio“ n-o 1.
„Der Bund“, Frankfurt a. M., n-o 11/1, 14.7. Ofic.org. de la Internac. Foiroj de Fr. kun dulingva ĉefartikolo (germ.-angle).
Eugenia, Barcelona. Kulturgazeto en kastila lingvo kun 6-kolumna Esperantoiraduko tre leginda.
Latvis, Riga, 14.7. E. kaj polico.
Meridian-Export Journal, Reichenberg, sen dato, eldonita de la foiro de Reichenberg en angla kaj franca lingvoj. Artikolo anglia pri E-o kiel komerca lingvo de J. Merchani, Sheffield.
New Jersey Post, Town of Union N.Y., 28.6., 27.7., pri nordamerika Esp. kongreso.
Reichenberger Grenzboten, Reichenberg, 17.7., pri la rekomendo de l' kongreso de Nürnberg en ciklerulo de l' germ. ministro Oeser.
Tribüne, Magdeburg, 20.6., pri Esperanto-kurso.
Volksstimme, Magdeburg, 5.7., pri Nürnberg Volkszeitung, Bromberg, 20.7., felietona iraduko el Espo. Kvar notoj pri Esperanto.
Norsk Bokbinder Tidende, Kristiania, 15.7., pri Esperanto-kurso.
France Europe Orient, Paris, 1.7.
Skara Tidning, Skara, 7.7., perserparantaj artikoloj
Temesvarer Zeitung, Temesvar, 10.7., 9.7., bel-konkurso de Esp. infanoj.
Jugoslavenki Narod, 9.7., 10.7., 11.7., 12.7., 13.7., 14.7., 17.7., Ugens Dzejsje, Riga, mejo, organo de la fairbrigadistoj La Caravane, Gailiac s. Tarn, junio. Noto pri Nürnberg.
Welschland (Le Pays Romand), Lausanne, novembro, februaro. Artikolo pri Ido. Kontraŭ-Artikolo de Esperantisto.
New Jersey Post, Union Hill, 30.6., du notoj pri Esperanto.
Geraisches Tageblatt, 30.6., Esperanto-Angulo pri Venezia.

Fumu

La Esperanto-Cigaretoj

„Tutmonda Esperanto“ „La verda stelo“

Cigaredomanufakturo Antehmo, Zittau (Saks.)

Nekrologo.

En Tannwald-Schumburg Ĉsl. moris la ĉefkuracisto saneca konsilanto D-ro A. P. Klimek.

Per lia morto la esperantistaro perdas altmeritajn samideanojn kaj fervoran UEA-delegiton, kiu ĉiam per la tuta povo de sia aŭtoritato morale kaj mone subtenis nian aferon.

Post la milito li ekvivigis la Esperanto-movadon, nun bele floran, en la lzermoniara kaj fondis E-grupon kies honora prezidanto li estis.

Honorigan memoron al la kara mortinto!

Anstataŭ floroj sur la ĉerkon dediĉis amikaj E.-societoj mondonacojn al la Dro-Klimek-fundo.

JUS APERIS „IDO DE ORFEO“ INTERESA ORIGINALA ROMANO DE H. J. BULTHEUS, L.K. Rekomendita de Esp. Lit. Asocio. — 842 paĝoj. 12 3/4 x 18 cm. Prezo: 2,25 guld. plus 0,50 guld. sendokto. Mendintoj ricevos la verkon post kiam ili sendis la monon. Libristoj havas rabaton! „Ido de Orfeo“ estas libro por ĉiu Esperantisto, precipe ankaŭ por la junularo, skoltaj ktp. Mandu ĉe la entreprenanto: La Anonima Societo, Centra Esperanto-Libreo en Den Haag (Direktoro: F. C. Koens), Bankstraat n-o 2-a.

Pruvoj instruas plej bone!

ke vi aĉetas bonŝtatajn pantalonojn ĉiusepacajn ktp. plej profiti ĉe mi.

Inter aliaj skribas s-o P. S. en Sheffield: „mi devas laŭdi vin por la bona formo kaj la bona maniero, kiel vi faris la pantalonon...“

Simile esprimas sin ankaŭ aliaj klientoj.

Tial provu ankaŭ vi!

Facile komprenebla mezur-sistemo. Malaltaj prezoj. Baldaŭna livero. Eksperto ĉiulanden. Malkaraj sendoktoj. Ankaŭ vendado de ne prilabiritaj ŝtofoj. — Postulu detalan oferton kontraŭ poŝtmarkoj aŭ stampit. resp. kup. de

Joh. P. Schmidt, Zittau i./Sa. 85 (Germanl.) Esperanto uzata!

Akra falĉilo

estas la sveda falĉilo „Diamant“ kun garantita akraĵo. Plejeble bona fabriko kaj absolute plej bona kvalito. — Ni garantias! — Petu specimenon Karsnäs Lieverks A. B., Karsnäs (Svedujo).

Anoncetoj.

- ESPERANTO-RONDO en Turn (Ĉeĥosl.) aranĝos lertesperton je la 4. sept. Oni petas samideanojn (escepte el Ĉeĥosl. kaj Germ.) interŝanĝi sendi let. il. pk. kaj pm. al s-o Karl Jühn, Lindenstr. 10-21 en Teplitz-Schönau (Ĉeĥosl.) [2]
EN SEPTEMBRO 1923 aperos Michel, Eŭropa, katalogo 1924. Prezo: 2 guld., 4 sv. flk., 5 sv. kr., 4 norv. aŭ dan. kr. 0,80 dlo, 12 lire, 20 ĉ. kr., 20 fmk., 2 jen 5 ŝil., 10 fr. aŭ belg. flk., 5 hisp. pes. + 25% sendoktoj. — Komercservo Bönning, Libanonstr. 45. Stutigart (Germanl.) [2]
LETERVESPERON aranĝos la 12. aŭg. 1923 „Esperanto-sekcio“ en Klostergrab (Nordbohem. Ĉeĥoslovakio). Samideanoj ĉiulandaj estas petataj sendi poŝtfojaĵojn al s-o Anton Hetzel, en Klostergrab, Nordstr. 99. [2]
FILATELISTO! Kiu sendas al mi 100-1000 poŝtmarkojn sialandajn nedifektajn, ricevas saman kvanton de Hispanujo laŭ lvert 1923. Gabriel Alomar, Prez. de EKP, str. Vallori 14 en Palma de Mallorca (Hisp.) [2]
BONKORAJ KURACISTOJ. Mi malsaniĝis antaŭ 4 jaroj je spinburkulo, sed ĝis nun mi ankoraŭ ne resaniĝis. Laŭ konsilo de la tiaj kuracistoj mi portis gipskorseton dum 4 monatoj, sed sen uilo, ĉar laŭ lia opinio la kurbigo estas tre malsupre. Se iu el vi scias certan kuracilon aŭ bonajn konsilojn, mi petegas vin helpi al mi. Aleksandr Parov, str. Miladinova 21, en Rusiuk (Bulgario). [2]
MILITINVALIDO petas bonkarajn samideanojn subteni lin per monhelpo, por fondi malgrandan vendejon. Bonvolu skribi al Esperantista Rondeto en Aschach a/Donau (Aŭstrio). [2]
KIU VOLAS HELPI aranĝi ekspozicion por propagando de Esperanto en Supra Silezio, bonvolu sendi il. pk. kaj Esperantofojaĵojn al s-o A. Jeziorowski en Otmachau, Oberschlesien (Germ.). [2]
DLI JUNAJ laboremaj amikoj! (unu estas selisto kaj preferas sian profesion) serĉas postenon kiel servisto aŭ laboristo, en sama loko. H. Wakonigg, en Köllach 258 (Slovakio, Aŭstrio). [2]
Korespondo kaj Interŝanĝo. Poŝtmark-vendejo Heribert Rosenlecher, Zeilshelmerweg 18, en Höchst a/M. (Germ.) dissendas belajn poŝtm. ge. rm. (uzitajn kaj neuzitajn) kontraŭ sendo de minimume 1,50 sv. flk. Postulu la deziritajn markojn laŭ katalogo Michel. [2]

- S-o J. E. Ruotsalainen, Leppäkoski, en Käkisalmi (Finl.) deziras korespondi pri poezio kaj literaturo kun ĝejujuloj poeltalantaj; deziras ankaŭ il. pk. pri insuloj kaj bordoj de Mediteraneo. [2]
Mi sendos por ĉeh. kr. serion de Ruhr-Rheinpoŝtmarkoj kaj de flugpoŝtmarkoj, (14 pecoj). Interŝanĝas pm. Walter Amori en Falkenhorst, Grünau b. Berlin (Germ.). [2]
S-o Br. Rajšič, Kr. Petra 44, en Zemun (Jugosl.) deziras seriozan interŝanĝon de pm. laŭ katalogo Michel. [2]
S-o Paul Müller, en Turn-Teplitz, Rittersstr. 544 Ĉeĥosl. deziras korespondon kun ĉiulandaj gesamideanoj per il. pk. (bfl.) kaj let., ankaŭ interŝanĝas pm. kaj gazetojn. [2]
S-o Ernŝt Malmgren, studento, Högalidsgatan Ho. A. Stockholm (Sved.) deziras korespondi kun kunuloj kaj aliaj Esperantistoj. [2]
Stefan Viechauer, en Wien IX, Tendlerg. 5/28 (Aŭstrio) deziras korespondi kun landanoj el ĉiuj landoj de la mondo per il. pk. aŭ let. [2]
S-o St. Malek, (21-jara) instruisto-seminariano, Sleiernwickska 3, en Lodz (Pol.) deziras interŝanĝi pm. kaj il. pk. kun ĉiuj landoj. [2]
Filatelio! Tre sperta filatelisto serĉas seriozajn amikojn en ĉiuj eŭropaj landoj, kiuj prizorgas pm. kontraŭ kontanta pago. Feldsmann, Unt. Mühlstr. 54 en Neustadt/Oberschl. (Germ.). [2]
S-o Josefa Caixach, str. Montseny 51, en Sabadell, (Hispan.) deziras korespondi kun gesamideanoj el la tuta mondo per il. pk. kaj let. [2]
S-o Dr. Stanislaw Holas, ĵuĝisto, Auenska 10, en Brno, (Ĉeĥosl.) deziras interŝanĝi il. pk. kaj pm. kun ĉiuj landoj. [2]
Mi deziras korespondi kun tuta mondo per il. pk., ankaŭ interŝanĝas pm. kaj papermonon. Stanislaw Dzius, Staro-Zagnanska 55, m. 1 en Kielce (Pol.). [2]
N. N. Filatov, Komunističeskaja 6, Novonikolaevsk, (Sib. Rusl.) deziras interŝanĝi pm. kun la tuta mondo. [2]
Dana farmisto deziras interŝanĝi il. pk. Adr.: s-o Tullesen ĉe s-o Prebensen Attrup, Trustrup, (Danujo). [2]
T. Amon, Düsseldorf, Mühlheimerstr. 1 (Germ.) deziras korespondadon kun Paris'aj samideanoj, kiuj vizitas Ĉeĥokuradon. [2]
Josef Paffenholz, en Düsseldorf 106, (Germ.) deziras korespondadon kun eksterlandaj gesamideanoj kiuj vizitas la XV an, por eble iĉia interkonfalon. [2]
Fratilo Tiberto Haydn, Banská-Bystřica, Lazovná 88, (Tatra, Ĉeĥosl.) deziras korespondi per il. pk. [2]
Sperta lingvisto-instruisto, s-o Madsen, Grenaa (Danujo) interŝanĝas pri E. Instruistoj kaj infanoj montru al li kiel disvastigita estas nia kara lingvo. [2]
Juozas Binkevicius, en Utena, Užupės gatvė N 5 (Litovujo), deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kaj papermonon kun ĉiuj landoj. [2]
Instruisto! Mi deziras korespondi pri kristanismo kaj teozofio. K. Lind, Staatskrankenanstalt en Langenhorn, M 10 b. Hamburg. (Germ.). [2]
Mi deziras korespondon kun seriozaj kaj idealaj fraŭlinoj, inter 18-20 jaroj, de la tuta mondo, per let. kaj il. pk. pri interesaj kaj sciencaj temoj. Esperante aŭ angle. Robert Pandikow, Peiboot III, Wilhelmshaven (Germ.). [2]
Kiu sendas al mi 50-100 pm. sialandajn ricevos saman kvanton de mia lando. Mi ankaŭ korespondas per il. pk. kaj let. kun ĉiulandaj gesamideanoj. Rich. Fischer, Schillersstr. 5 en Wittenberge, Bez. Pdm. (Germ.). [2]
Juna dentoteknikistino deziras korespondi pri dentotekniko kaj pri diversaj temoj kun kuracistoj aŭ inteligentuloj el la tuta mondo. Margarete Armutz en Kapovštr., Koronata 14 (Hungarlando). [2]
Mi deziras interŝanĝi pm. kaj il. pk. el ĉiuj landoj. Mi povas doni ĉeĥajn, rusajn kaj polajn pm. Isaj Czerny en Warszawa (Polujo) Ogródona 25. [2]
S-o Stefan Vardev, en Petrič (Bulg.) deziras korespondi pri diversaj temoj kun tutmondaj ĝejujuloj, pretere kun progresintoj en la lingvo. [2]
S-o Ludoviko Heimlich, en Kapovštr Konrassy u. 9. (Hungar.) deziras korespondi kun ĉiulandanoj precipe ekster-eŭropanoj, ankaŭ interŝanĝas pm. po 50-100. [2]
Po pakajo 100 hung. pm. diversajn el 1910-20 mi sendas en granda kvanto laŭ interkonsentota prezo. Pli malgranda kvanto en egalvalor de hung. kr. 1100. — En ia ajn mono. Mi respondas nur por mono sendita en rekomendita letero aŭ per banko. Konto ĉe la Nacia Kreditinstituto A. S. (Nemzeti Hitkintézet r. l.) provinca filio, Budapest VIII, Rákóczi ut. 9. Korespondeo en lingvoj esp., germ., eble franca. Hungara Poŝtmarko — Vendejo kaj — Interŝanĝejo, Esperantista Komercisto Zoltán Balázs, Tapiószéle (Hungar.). [2]
S-oj Franz Hecker, Gneisenaustr. 13 III. kaj Richard Prause, Kirchstr. 2, ambaŭ en Waldenburg i. Schl. deziras korespondi kun ĉiuj landoj per il. pk., por perfektigi en Esperanto. [2]
S-o Stefan Millejaus en Materborn b. Kieve (Rheinl. Germ.) Schulstr. 20 IV. deziras korespondi per il. pk. kun gesamideanoj de ĉiuj landoj. [2]
Sendu bonajn pm. al s-o Arne Meldgaard Nielsen, Lillégade, Grenaa (Danujo); mi respondos tuj per sama kvanto. [2]
S-o J. A. van Dort, Kerssstraat 22, en Utrecht (Nederl.) deziras korespondi kun 18-21 jaraĵ gesamideanoj el ĉiuj landoj per let. kaj il. pk. [2]
Filatelisto! Kiu sendas al mi 50-100 pm. de sia lando ricevos samkvanton de Ĉeĥoslovakujo. Richard Horatlik, Kumžack 148 (Ĉeĥoslov.). [2]
S-o Gian Edilio Brisson en Genova (9. Corso Buenos Aires 17/7 (Italujo) deziras korespondi pri ĉiuj temoj kun gesamideanoj ĉiulandaj per leteroj kaj poŝtmarkoj, same knabo Bruno Brisson, 14-jara kun samaĝuloj. [2]
Ni tri fraŭloj deziras korespondi per leteroj pk. ktp. kun ĉiuj landoj. John Vainio, Ertiki (Finklandino), Vainö Abde Kastrenink 11, J. 82 en Helsinki (Finklandio) [2]
S-o Conrad Creter, poŝtinspektoro, ĉe supera poŝtdirekcio, en Köln (Germ.) deziras korespondi kun gesamideanoj el la tuta mondo per il. pk. (bfl.). [2]
Mi deziras interŝanĝi pm. kun seriozaj kolektistoj de ĉiuj landoj. Mi preferas Holandan, Svedojn, Norvegiujon kaj Danujon. Danove Giuseppe, via Casaregis 26-6, en Genova IX (Italujo). [2]
Kiu povas liveri poŝtmarkojn de Albanio, Belgio, Danujo, Estonio, Latvio kaj Litovio? Ne fantaziaj prezoj! F. E. Farwerck, en Hilversum (Nederlandl.) Emmastraat 58. [2]
S-o Reinhard Müller Berthelsdorferstr. 48, en Freiberg/Sa. (Germanujo) deziras interŝanĝi il. pk., let. pm. kaj papermonon kun ĉiuj landoj. [2]
Vasil Nikolov, 18-jara gimnaziano, en Gorna Ĝumajoj (Bulg.) deziras korespondi kun ĉiuj landoj per il. pk. (bfl.) kaj let. ĉiuteme, precipe kun ĝejujuloj. [2]
Je mia anonco pri korespondeo mi ricevis tiom da respondoj ke al mi ne estas eble, skribi al ĉiuj. Mi tial petas ilian pardonon. Gust. Johansson en Falun. [2]
S-o Otto Nitsche, Petersburgerstr. 46 en Berlin O. 54. sendas tuj 100 germ. pm. kontraŭ sama kvanto de alia lando. [2]
Poŝtmarkojn el orientaj landoj vi plej malĉeas aĉetas ĉe Eldonejo „Esperantista Voĉo“, en Jaslo (Pollando). Ni sendas pm.-ciklojn kontraŭ bonaj referencoj aŭ mondepono. Interŝanĝas pogrande; fuosendadoj malakceptataj. [2]